# *Kubo kaj Belarusio: dialogo en Havano.*



La kuba prezidento Raúl Castro, prezidanto de la ?tata kaj ministra konsilantaroj  de Kubo, akceptis en Havano la eminentan sinjoron Vladimir Vladimirovich Makei, ministro pri eksteraj rilatoj de la respubliko de Belarusio, kiu plenumas oficialan laborviziton en la kariba insulo.
Amba? gvidantoj dialogis pri la eminentaj statoj de la ekzistantaj rilatoj kaj perspektivoj pri ampleksigo kaj plifortigo de la reciprokaj ligoj.
Anta?e, la elstara vizitanto trairis la komercan foiron de la Unua Internacia Ekspozicio kaj Kongreso Internacia de la kuba industrio, Cubaindustria 2014, okazanta en la foirejo  de Pabexpo en la okcidenta parto de la kuba ?efurbo.
La elstaran vizitanton akompanis Vladzimir A. Astapenka, ambasadoro de Belarusio en Kubo. Flanke de Kubo ?eestis la ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodríguez Parrilla.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/26787-kubo-kaj-belarusio-dialogo-en-havano